

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 8.6.2005*

## **Kion kun poŝtelefono?**

*Miroslav Hruška*

Poŝtelefonoj estas fenomeno. Preskau ĉiu havas poŝtelefonon, iu iam du au tri au pli. Unue estis poŝtelefonoj grandaj kaj ankau kun antenoj. Hodiau estas poŝtelefono modo. Uzado de poŝtelefonoj: ni povas voki, kie vi volas kaj kie vi havas signalon. Vi povas sendi somosojn, se vi havas poŝtelefonon kun kolora monitoro, vi povas sendi ilustritajn mesagojn. Novaj poŝtelefonoj havas ankau fotoaparatojn, sed tiaj poŝtelefonoj estas multekostaj. Prezoj tamen falas. Kaj tio estas problemo. Vi acetas tute novan poŝtelefonon kaj baldau via poŝtelefono ne estas tiel multekosta. Evoluo venas antauen. Poŝtelefonoj povas ludi muzikon. Poŝtelefonoj havas ankau malgrandan Interreton. Certe, junularo povas ludi ludojn. Iaj poŝtelefonoj estas pli rezistaj. Sed, por uzado de poŝtelefonoj vi devas havi operatoron. En ĉeĥa respubliko estas tri operatoroj: Oskar, Eurotel kaj T-mobile. Oskar estas jam Vodafone. Mi havas Oskar. Ekzistas ankau gazetoj pri poŝtelefonoj, pri ludoj en poŝtelefonoj. Disigo de poŝtelefonoj: koloraj kaj nigrablankaj. Multekostaj kaj malmultekostaj. Kun malbona fotoaparato kaj kun bona fotoaparato. Stultaj kaj sagaj. Poŝtelefonoj por junularo, pro ordinaraj homoj kaj por manageroj. Iaj poŝtelefonoj estas en formo de litero "vo". Iaj poŝtelefonoj havas grandan monitoron. Vi ankau povas kunigi poŝtelefonon kun komputilo au poŝtelefonoj reciproke. La plej bonaj poŝtelefonoj estas en Japanio kaj en Koreujo. Markoj de poŝtelefonoj: Siemens, Nokia, LG, Motorola, Samsung, Sony Ericsson kaj tiel plu. Jes, novaj poŝtelefonoj kun koloraj monitoroj povas filmi videon. La evoluo ebligas havi malmultekostan aparaton, kiu filmos videon bone, fotos bone, kaj estos facile manipulebla. Gi estas nur demando de tempo kaj demando de redukto. Ekzistas katalogoj de poŝtelefonoj, ekzistas pagoj en Interreto pri poŝtelefonoj, ekzistas ofertoj de ludoj, muzikoj kaj bildetoj. Sed ofertoj ne estas malmultekostaj. Poŝtelefonoj ankau havas memorilon por muziko, por ludoj, por bildetoj. Fino, dankon.